

Novajoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Rekviemo eĥe leviĝis en la martan ĉielon!

La 9an de marto okazis muzika ceremonio memore al la viktimoj de la Nordorienta Katastrofo pro cunamo en marto 2011, en la havena Parko Jamaŝita, antaŭ la granda ŝipo Hikaŭamaru ankrita, nome la simbolo de Jokohamo. 8 ĥoranoj de la Jokohama Esperanto-Rondo partoprenis en ĝi kun ĉ. 100 geknaboj de la fame konata Jokohama Geknaba Ĥoro. Sub la konduktado de s-ro Makino kaj s-ino lida, entute 4 kantoj inkluzive de Rekviemo estis tre bele prezentitaj sur la fono de la ŝika ŝipo kaj la blua maro. Multaj homoj kolektiĝis ĉirkaŭ la koncertejo kaj aŭskultis la kantojn emociite. Ŝajnis, ke eĉ hazardaj vizitantoj al la parko tuj komprenis la celon de ĉi tiu evento per 60 grandaj literoj da slogano tuĉe skribitaj kaj montritaj po unu per ambaŭ manoj alte levitaj de la geknaboj. Je la preciza horo de la katastrofo, la ĉeestantoj silente preĝis unu minuton kun la fajfego de la ŝipo, por la animo de la mortintoj. Tiel la unu-hora muzikprezentado finiĝis sukcese en kortuŝa etoso.

Ĉi tiu plano estis farita de s-ino Takadate, prezidanto de Tooni Eduka Fonduso en la urbo Kamaŝi, unu el la plej suferintaj distriktoj pro la cunamo. Post la granda katastrofo, ŝi tuj starigis la fonduson por helpi suferantajn lernantojn kaj de tiam senĉese laboras energie. Bonŝance mi unuafoje renkontis ŝin tiutage kaj ricevis profundan impreson pri ŝia personeco. Ŝi partoprenis ĉi-fojan eventon por klarigi tiean situacion kaj esprimis

dankegon por ĉiuj subtenantoj. Multe da ofermono kolektiĝis por donaci al la fonduso.

S-ro Makino, membro de Jokohama Esperanto-Rondo kaj sperta direktanto de muzika ĥoro, simpatiis kun la muziko Rekviemo origine farita de la societo de emeritaj ĉefinstruistoj de publiklernejoj en la gubernio Iŭate. Li decidis kanti ĝin japane kaj Esperante. Dank' al s-ro Konisi Gaku la kanto estis esperantigita, kaj tiu versio estis ankaŭ kantita. Kaj dank' al la japanigo de s-ro Hori Jasuo, la japanlingva versio de la himno La Espero estis unuafoje kantita de la lernantoj ne-esperantistaj. S-ro Makino zorgis multe, ne nur pri kantado, sed ankaŭ pri diversaj kontaktoj necesaj por realigi ĉi tiun eventon. Sen lia aktiveco ĉi-foja evento ne tiel sukcesis. La sincerecon de s-ro Makino kredeble subtenas la pacan ideon de Esperanto.

(AIDA Yayoi)



kantantaj Hama-Rondanoj antaŭ Hikawa-maru, fotita de s-ro Aida Kiyoshi

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

TIEL OKAZIS**FOIRO DE LA CIVITANAJ AGADOJ**

*la 9-an kaj la 10-an de marto, en la ekspozicia halo ter-etaĝa

Ni kunvenis en la gubernia konstruaĵo malferma al la grupo de civitanaj agadoj. En la tagoj, la grupoj ekspoziciis pri sia agado, uzante unu tablon da spaco. Ni do ekspoziciis pri Esperanto.



Esperanta budo

KANTADO DE "REKVIEMO"

Vidu la paĝon 1!

HAMA-RONDA VESPERO

*la 16-a de marto, 17h00-19h00, ĉambro 708

La KER-ekzameno estis klarigita de Sibayama Zyun'iti. Post ĝenerala enkonduko, parto de la specimenaj demandoj de la niveloj B1, B2 kaj C1 estis prezentitaj, kaj oni havis tempon rigardi, kiajn demandojn oni efektive donas. Espereble, kelkaj el la rondanoj estos ekzamenitaj en la venonta junio en Tokio. Ĉeestis 8 membroj.

NIAJ PLANOJ**UNU-TAGA KURSO**

*la 13-a de aprilo, 16h15-17h45, ĉambro 603

Kio estas Esperanto, kaj enkonduko pri la lingvo. Espereble ĝi logos novajn lernantojn de rudimenta kurso komencota de la 20-a de aprilo.

HAMA-RONDAJ VESPEROJ

*la 20-a de aprilo, 17h30-19h00, ĉambro 404

Nia Hama-Rondo (Jokohama Esperanto-Rondo) fariĝas 45-jaraĝa. Historio de la rondo estos revuita.

*la 18-a de majo, 17h00-19h00, ĉambro 604

Ni gastigos ges-rojn Kleemann el Germanio. S-ino Kleemann estas japano edziniĝinta per Esperanto.

*la 15-a de junio, 17h00-19h00, ĉambro 601

Pri Esperanto en Afriko, de s-ino Doi Ĉieko. Fakte, tiu temo estis farita al la urbanoj en februaro, kaj tiu ĉi ŝanco estas precipe al la rondanoj. Multo el la materialo ŝuldas al s-ino Mirejo Groĵan, vizitinta Jokohamon en 2012.

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Rudimenta kurso: Komencota de la 20-a de aprilo.

*Regulaj klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

*Regula klaso en merkredo por legado de "Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj".

Informiloj el eksterlandaj rondoj

Ni ĉiumonate ricevas informilojn de subaj rondoj interŝanĝe de nia "Novaĵoj Tamtamas":

AEH - Asocio de esperantistoj-handikapuloj

CERL - Centro Esperanto de la regiono Lyon (el Francio)

Mi afiŝas senditajn numerojn sur la suba retejo. Bonvolu viziti ĝin kaj elŝutu ilin.

<https://skydrive.live.com/?cid=0AE2D0B68AAC582F&id=AE2D0B68AAC582F1361>

(Mizro Iwaya)

90-a Legokunveno "Viktimoj"

Ni havis legokunvenon en la 9-a de marto. Kolektiĝis 8 legintoj de "Viktimoj", verkita de Julio Baghy.



Viktimoj

Mizro Iwaya

Tiu romano estis unue publikigita en Literatura Mondo kaj kaŭzis grandan sensacion en la Esperantujo. Tiel okulfrapa kaj grandioza estis la enhavo. Ĝi estis eldonita libroforme jam en 1925. Oni diras ke ĉiu nacio havas sian "nacian literaturon". Se temas pri Esperanto, tiu ĉi libro devas esti unu el ili.

Tiu ĉi estas fikcia travivaĵo de militkaptitoj en Siberio tuj post la rusia revolucio. La aŭtoro mem estis militkaptito dum kelkaj jaroj, tial la enhavo estas konkreta kaj detala. La milito estas tragedia kaj samtempe dinamika. La amafero estas interesa kaj atentoveka. Se oni kombinas tiujn du aferojn, do la rezulto devas esti tre interesa al ĉiuj legantoj. Tiu taktiko bone sukcesis en tiu verko.

La historio vikle ekmoviĝas de la kvina ĉapitro. Tiam okazis re-revolucio fare de la ruĝa armeo. Tie miksiĝas la amafero inter Johano, la ĉefrolanto, kaj Katja, edzino de rusa prokuroro. Ŝi ofte amindumas al Johano sed la lasta ne facile akceptas ŝin pretekste de sia edzino en la hejmlando, Hungario. La konduto de Katja kontraŭ tiu "rifuzo", ŝanĝiĝas de tempo al tempo. Ŝi foje persiste amindumas plu, foje komplotas kontraŭ li. Tia ŝanĝemo embarasas nin, sed estas fakto ke tio pli tiras nian atenton ĝis la fino. Ankaŭ aliaj epizodoj ĉirkaŭ ili estas bunte ornamitaj en la verko, kaj ili formas grandiozan spektaklon de historia dramo, la rusia revolucio. Oni povas legi ĝin ankaŭ kiel aventuran romanon.

Mi konstatas ke la verko prave montriĝis leginda literaturo de Esperanto. Ankaŭ la sekva verko, nome "Sur sanga tero", estas interese atendata.

"Viktimoj" fine de la rakonto

Sibayama Zyun'iti

En la fino de la ducent-paĝa rakonto, legantoj scias, ke temas pri "viktimoj" de la interhomaj amo- kaj malamo-pasioj plektitaj kun la viktimoj de la milito. Sed en la komenco mi miris pri la hela tono de la rakonto, eĉ se temas pri militkaptitoj. Ni japanoj konas la tragedian sorton de japanaj soldatoj, kiuj post la japana kapitulaco al la Sovet-Unio restis en Siberio militkaptite. En tiu ĉi rakonto, tamen militkaptitoj en iu rusa tero vivas relative paco --- krom tio, ke ili ne povas hejmen reveni por pluraj jaroj. La protagonisto Bardy, aktoro, do samprofesia al la verkinto Julio Baghy, povas akompani rusan virinon al la urbo, for de la kaptitejo --- kvankam tio estas araneaĵo kaptanta lin, kaj tiu Bardy kun samprofesiuloj povas okazigi teatran prezenton al 1200 homoj. Mire mi legis tiun parton.

Nu tamen por mi tute enigme estas la situacio de milito kaj kaptiteco. Kiu batalis kontraŭ kiu, kaj kiu rajtigas la hungarojn resti kaptitaj? De la mezo aperas batalantoj el la ruĝa flanko, kiu en la pli multa parto de la posta duono de la dudeka jarcento certe regis Ruslandon, kaj mi el historia kono scias, ke ili potenciĝos postrakonte. Sed la rakonto estas tuta ĝis-dataĵo sen klarigoj. Ni do deziras havi historian klarigon por tio. Nu, tamen, iuj el la rakontitaj personoj iras ruĝen, aliaj blanken, por interbatali, kaj tiel estiĝas nature viktimoj...

Mi aldonu, ke interesis min multaj interjekcioj, kaj iuloke dialekta esperantaĵo, kiel "ĵos mi aadis teon", t.e. "ĵus mi aŭdis tion".

“Viktimoj”, bona gvidlibro al Esperanta Literaturo

Aida Yayoi

Mi renkontis ĉi tiun romanon unuafoje en la legokunsido de Hama-Rondo en 1996. Ĝi imponis min. Ekscitite mi legis ĝin du fojojn. Ne nur la interesa rakonto mem sed ankaŭ supera esprimovo de la aŭtoro impresis min profunde. De tiam 17 jaroj pasis, kaj denove mi havis bonŝancon legi la saman romanon en nia sama legokunsido. Je mia surprizo la romano neniom perdis tiaman ĉarmon; la viveca priskribo estis tiel komforta, ke mi finlegis ĉi-foje la trian legadon unuspire ĝis la lasta kulmino de doloro kaj malespero. Kaj mi konstatis, ke “Viktimoj” estis por mi la gvidlibro al Esperanta Literaturo kaj ke, mi estis feliĉulo konatiĝi kun la aŭtoro Julio Baghy en la relative frua periodo.

La romano estis verkita en 1925 kiel la unua Esperanta Originalo surbaze de la aŭtoraj spertoj en Siberio dum la unua mondomilito kaj la rusa revolucio. Multaj soldatoj estis senditaj el diverslandoj por helpi aŭ malhelpi la Rusian Imperion. La aŭtoro estis rekrutigita el tiutempa Aŭstra-Hungara Imperio por kontraŭbatali la revolucion sed militkaptite devis labori en Siberio. Sur tiu fono la romano bildigas diversspecajn viktimojn, ĉefe militkaptitojn sed ankaŭ la rusojn vivantajn en tiu regiono. Malbenita sorto englutis ilin egale en la abismon de agonio.

La viktimoj” temas pri esence tragika evento, sed ĉiu sceno ne ĉiam estas mizera kaj kruela. Ĝi spegulas tre emocie variajn epizodojn en

individuaĵ vivoj; patosa amo de rusa virino, senfrukta sopiro de ruĝarmeaj knabino, unika pacifismo de juda brokantisto, severa sinesploro de la protagonisto, amikeco inter samlandanoj, prokuroro de blankarmeoj kontraŭ ideala personeco de protagonisto ktp. Allogaj scenoj aperis de ĉapitro al ĉapitro, stimulete la scivolon de legantoj al sekva okazaĵo. Mi kredas, ke oni povos gustumi la diversecon laŭ sia plaĉo. Vera romano, laŭ mi, devas esti distraĵo. En tiu senco “Viktimoj” certe estas la unua-ranga romano.

Julio Baghy estis profesia aktoro kaj bone sciis teatran arton, precipe efikon de voĉoj. La rafinita vortumo voĉlegeblas kiel poemo. Laŭ s-ro Benczik lia lingvo estas “natura kaj matura”, kiun oni bone sentos per voĉlegado de la frazoj. Kun fluanta ritmo la dialogocentra stilo efikas al facila legado. “Viktimoj” povus esti rekomendinda kaj rekomendenda kiel bona libro por diversgradaj Esperantistoj, eĉ la novbakitaj esperantistoj.

Laste mi citos el la romano animrabaj vortoj de la protagonisto Johano Bardy;

---Mi estas revulo, mi vivas en sonĝoj. Se iu forprenus de mi tiujn ĉi sonĝojn, kiuj fariĝis mia vivcelo, mi nepre mortus... Multfoje mi sentas, ke mia vivo estas nur kartfortikaĵo, kiun mi konstruis sur sonĝ-fundamento, por ke mi ne estu senĉese turmentata per la vido de la ruinoj.----

Redaktanto desegnis

La redaktanto klarigas temposkemon por publikigo de niaj gazetoj

